nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2015

## NOVA KURSO DE ESPERANTO ĈE MEL

Komenciĝas la nova akademia jaro, kaj samtempe nova ŝanco lerni Esperanton. En Madrido, alia sezono de la kurso organizata de Madrida Esperanto-Liceo ekas en oktobro, sub la gvido de Juan del Castillo. La klasoj disvolviĝos ĉiujn sabatojn, depost la 11a horo, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13.

La klasoj organiziĝas en diversaj niveloj, de komencantoj ĝis progresantoj. Por aliĝi kaj koni pliajn detalojn, skribu al la adreso de MEL: madrid@esperanto.es, aŭ telefonu al la numero 638547104.

Aliflanke, la liberecana asembleo de Karabanĉelo petas instruiston por nova kurso. Volontuloj bv kontakti ilin ĉe: asamlibertariacarabanchel@riseup.net







## EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La 26an de septembro, sabate, MEL aliĝis al la kunmemoro de la Eŭropa Tago de Lingvoj, ĉiujare organizata de la Konsilio de Eŭropo, per prelego pri Esperanto, en kiu Juan del Castillo prezentis ankaŭ la kurson kiu nun komenciĝas. Lin prezentis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio. Ĉeestis deko da interesitoj.

## MADRIDANO EN POZNANO

En septembro komenciĝis nova semestro de la Interlingvistikaj Superaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz en Pollando, la nuraj universitatnivelaj dediĉitaj al la artaj lingvoj, kiun partoprenas Félix Jiménez, membro de MEL.

Li ankaŭ partoprenis en la kultura festivalo ARKONES en Poznano (25-27 septembro) kaj prezentis la filmon "Stranga Nupto", produktitan en la instalaĵoj de MEL en la 80-aj jaroj.

## KONGRESOJ DE ESPERANTO EN HISPANIO

Jam troviĝas en la reto la formularo por aliĝi al la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Herrera del Duque (Ekstremaduro), inter la 30 de junio kaj 4 de julio 2016. Aliru la retejon http://www.esperanto.es/kongreso, kie estas trovebla la ŝanco rekte aliĝi. Oni jam komencis plani la kulturan kaj turisman programon, pri kiuj ni informos baldaŭ. Dume, utiligu la adreson kongreso@esperanto.es se vi deziras kontakti la organizantojn.


Pli frue, de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015 disvolviĝos en Jerez de la Frontera la 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, pri la ĉeftemo "Esperanto kaj Universitato". Ĉiuj informoj pri programo, aliĝo kaj gastado troviĝas en la retejo de AEU, ĉe la adreso: https://andaluziaesperanto.wordpress.com/.

## EKSPOZICIO DE ESPERANTO EN PINTO

Dum la monato septembro la ekspozicio pri Esperanto muntita per la paneloj kreitaj de HEF, estis vizitebla en la mezlernejo Mirasur, de Pinto.




## EKSPOZICIO DE TRADUKOJ DE DONKIĤOTOJ




De antaŭ pluraj semajnoj kaj ĝis la dimanĉo 4-a de oktobro oni montras ekspozicion pri tradukoj de Donkiĥoto en la biblioteko de la Instituto Cervantes:

http://www.cervantes.es/FichasCultura/Ficha100831_00_1.htm

En ĝi troviĝas kopio de Donkiĥoto en Esperanto (en la foto, apud la latina versio)

La ekspozicio estas unu el la agadoj de la celebrado de la kvara datreveno de la dua parto de Kiĥoto, al kiu ankaŭ HEF kontribuas.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Ni baldaŭ anoncos temojn kaj aranĝojn.

En la momento de fermo de tiu ĉi bulteno oni ankoraŭ ne decidis la detalojn de la oktobra sabata babilado. Ĝi okazos la 3-an de oktobro, sed atentu la forumojn por koni lokon kaj horon.

Por esti informitaj pri tiu ĉi kaj aliaj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/. En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com